

# Novaĵoj Tamtamas

Internacia Gazeto de Esperanto Jokohama (Hama-Rondo)

エスペラントよこはまのエスペラント文会報

## EL NIA MUZEO

— kio estis, kiel estas en Esperanto-Muzeo Jokohama —


### Libroj pri atombomboj en la reta Japana Kongreso

Kiel jam informite en nia n-ro 365 (julio), ni ricevis ĉ. 40 librojn pri la katastrofo kaj la postaj scenoj de la atombomboj, faligitaj sur Hirosima kaj Nagasaki en 1945. Okaze de la 108a Japana Esperanto-Kongreso, plenumita tute rete, tiuj libroj estis prezentitaj unu post la alia, en la kadro de tele-kunsido de 10:00 ĝis 10:50 en la 20a de septembro, kaj rigardita de ĉ. 50 personoj.

Cetere, la Kongreso mem estis de la 18a matene ĝis la 20a posttagmeze de septembro 2021, partoprenita de entute 350 personoj, el kiuj 55 el aliaj landoj.

### Pli ol dek mil ekzempleroj katalogitaj

Fine de septembro, la nombro de katalogitaj titoloj superis dek mil. Tiuj titoloj inkluzivas librojn, binditajn kolektojn de gazetoj, ne-vinditajn numerojn de gazetoj, katalogoj ktp. Ankoraŭ restas 19 kartonaj kestoj kun plene da titoloj katalogotaj.



## eĥoj tutmondaj

### el Aŭstralia Radio ZZZ

Saluton,

Koran dankon pro la sendado de plia numero de Novaĵoj Tamtamas.

Per ĝi mi eksciis pri la forpaso de Aida Yayoi kiun mi persone renkontis antaŭ kelkaj jaroj kaj kun kiu mi dumtempe interŝanĝis leterojn. Kondolencojn al ŝia edzo,

Franciska


### el Demokrata Kongolanda Esperanto-Asocio (DKEA)

Kara amiko Sibayama, nome de DKEA (landa asocio) ni ĝojas ricevi regule viajn revuojn. Multe dankon. Ni ankaŭ sendos niajn revuojn.

Amine JP LUNGKISA

## La 122-a Legokunsido

En la 3a de septembro ni havis la 122-an legokunsidon por libroj kiujn oni libere elektis. Partoprenis kvar personoj kiuj legis libron, kaj du observantoj.



### pri “HOODJOOKI”

Kamo no Ĉomei, esperantigita de Nohara Kiuiĉi  
eldonita de Japania Esperanta Librokooperativo (KLEG), 2020

Tanigaŭa Hiroŝi

La “HOODJOOKI” estas esperanto-traduko de la “Hooĵoo-ki” (「方丈記」), fama eseo verkita de Kamo no Ĉomei en la komenco de la japana mezepoko (1212).

“Hooĵoo” signifas areon de dekfut-kvadratoj, kaj en ĉi tiu eseo montras “dekfutkvadratan kabanon”. La “Hooĵoo-ki” estas priskribo pri la vivkoncepto kiun Kamo no Ĉomei akiris dum li loĝis en la “dekfutkvadrata kabano” en profunda monto. Jen la enhavo resume:

*La homa vivo estas nekonstanteca same kiel la surfluaĵoj. Ĉiaj mondaj aferoj vantas post ĉio. Loĝante en la dekfutkvadrata kabano mi povis ĝui perfekte liberan kontentigan vivon apartiĝinte de ĉiaj eksteraj aferoj. Ĉiuj komprenos tion kiam ili spertos loĝi kiel same.*

Ĝis nun mi komprenis, ke la esenco de la eseo estas senrezerva laŭdo pri la vivo en modestega kabano foriĝinte de ĉiuj aktualaj mondaj aferoj. Ĝi ŝajnis rezonebla reflektante la tumultegajn sangajn jarojn en la komenco de la mezepoko.

Sed, releginte ĝin ĉi-foje, mi rimarkis alinuancan priskribon en ĝia fina ĉapitro. Mi atentis jenajn liniojn;

*Iam en kvieta antaŭtagiĝo, mi profunde enpenŝiĝis kaj demandis al mia animo: - “Vi retiriĝis de la mondo kaj rifuĝis en la monton, por ke vi kulturu vian koron kaj iradu laŭ la vojo de la Budho. ... Ĉu, tamen, vi ankoraŭ suferigas vin pro malriĉeco? Ĉu malbona ideo vin frenezigas?”*

Ŝajnas, ke la aŭtoro trovis sin perdiĝinta

en la vesperaj jaroj de la vivo! La loĝo en la dekfutkvadrata kabano ne garantiis aktuale al li la finan animan trankvilon!!

Tio estis por mi ŝoka retrovo. Mi serĉis eventualan klarigon en jenaj libroj.

© “Hooĵoo-ki” de Jasuraoka Koosaku. (「方丈記」全訳注: 安良岡康作 (講談社学術文庫 1980))

© “Hooĵoo-ki” de Asami Kazuhiko. (「方丈記」校訂訳 浅見和彦 (ちくま学芸文庫 2011))

Leginte ĉi-suprajn, mi eksciis, ke la aŭtoro vivis plenaktive dum preskaŭ la tutan vivon. Kiam 30-40-jaraĝa, li sukcese aktivis ĉefe en la kampo de versfarado en kortega societo. Sed kiam 50-jaraĝa, li malsukcesis fariĝi pastro de ŝintoisma templo. Li bonziĝis forĵetante ĉiajn mondajn aferojn kaj ekloĝis en monta kabano. Kaj 5 jarojn poste li transloĝiĝis en pli profundan monton kaj ekloĝis en la modestega “dekfutkvadrata kabano”. Kaj tie li akiris la vivkoncepton supre menciitan.

Sed lia aktiveco ne haltis eĉ post la ekloĝo en la dekfutkvadrata kabano. Kiam 57-jaraĝa, li vojaĝis pli ol 500 km por renkonti tiaman ŝogunon Minamoto-no-Sanetomo en la urbo Kamakura. Lia celo estis fariĝi instruisto de Sanetomo pri la versfarado. Tamen, li malsukcesis en tio kaj devis reveni al sia monta kabano. Kaj li ekverkis la “Hooĵoo-ki”-on.

Eksciinte la aktualan aktivemon de la aŭtoro eĉ dum li loĝis en la modestega kabano, mi ekhavis intiman senton al la vivmaniero de la aŭtoro. Kun la sento de la perdiĝo de la aŭtoro, la eseo “Hooĵoo-ki” akiris intiman simpatiecon de la legantoj trans la generacioj ĝis nuntempo, mi pensis.

## "Streĉita Kordo" de Kalman Kalocsay

Mizro Iwaya

En la lasta libertema legokunsido (la 108a, junio 2020) mi diris ke "La Infana Raso" disrompis la baron ĝis tiam tradician. Kio estis tiu baro? Ĝi estis la kadro fiksita de "Parnasa Gvidlibro", kies protagonisto estis Kalman Kalocsay. Li jam praktikis multon kaj rikoltis el siaj verkoj la frukton de poezia tekniko en tiu libro. Kaj la praktikita ĉefverko estas tiu ĉi "Streĉita Kordo".

Ĝi aperis en 1931 sed ĝia ĉefa enhavo jam aperis en la gazeto Literatura Mondo jarojn antaŭe. Ĝi estas poemaro kiu enhavas ĉirkaŭ 100 poemojn en sep ĉapitroj. La apero de tiu ĉi libro kaŭzis sensacion, ĉar la superrigardo al dispecigitaj poemoj liaj estis grandioza. Ĝi disrompis la kvalitan limon de esperanta poezio en granda skalo. Ja ĝi markis novan epokon per tiu libro.

La aŭtoro ekaktivis en Esperanto tuj post la unua mondomilito: t.e. nur 30 jarojn post la apero de la Unua Libro. La esperanta kulturo estis ankoraŭ ne matura kaj mankis diversaj "klasikaĵoj": majstra poezio, klarvida poez-teorio kaj detala gramatiko de la lingvo. Kalocsay mem faris ĉion per "Streĉita kordo", "Parnasa gvidlibro" kaj "Plena analiza gramatiko". Ne nur tio. Li eĉ ŝtopis restantan niĉon per aliaj plumnomoj, ekzemple Peter Peneter, C.E.R.Bummy, k.a. Tial ni povas diri ke li estas la dua kreinto de Esperanto post Zamenhof.

Ni japanoj bone scias ke la socia sistemo estis tute ne matura antaŭ 150 jaroj, en la epoko de Meiji post la detruigo de antaŭiranta Edo-epoko. Oni devis konstrui la ordon de la socio rapide elde la unua stadio. Tiam aktivis diversaj "gigantoj" en diversaj fakoj en Japanio. Unu el ili estis, nun fama, Ŝibusaua Eiiĉi. Li entreprenis pli-malpli 500 firmaojn. Ni povas vidi ke li estis same "giganta" kiel K. Kalocsay. Tia estis la socia postulo ĉe la komenco de la nova epoko.

Kompreneble ankaŭ la aŭtoro ŝuldis multon de antaŭuloj. Precipe pri A. Grabowski li

dediĉis unu poemon por omaĝi al lia atingajo. Samtempe mi trovas diversajn pecojn troveblajn en la libro kiuj priskribas la tendencon de Esperanto-movado en lia tempo.


"Korprintemp'" estas plezura liriko pri juneco kaj amo. Precipe "Maja idilio" plaĉas al mi pro ĝia elstara agordo de rimo kaj ritmo. Jen fama strofo el ĝi:

Iru, iru,  
Tra la pord' el oro,  
Diru, diru,  
Kiun amas koro,  
Dancu, saltu,  
Sed ĉe ŝi haltu,  
Kisu, ĉirkaŭprenu,  
Dio vin kunĉenu!  
Brulu ĉiam am' en  
Viaj koroj, amen!

"Ahasvero de amo" estas historio de maletike devojiĝinta edzo. Lia korinklino estas videble esprimata en la strofoj. Oni povas facile kritiki tian sintenon, sed verdire ĝi elvokas simpatian.

"Ebria ekvatoro" estas surpriza atingo de la aŭtoro. Ĝi priskribas la mondon en nenie trovebla grandiozo kaj libereco. La verkoj ofte ne havas ritmon nek rimon aŭgurante venontan disvolvon de esperanta poezio.

Ni povas facile superrigardi la atingajon de esperanta literaturo en ĝia frua etapo per tiu libro. Ĝi estas akirebla ankoraŭ nun. Mi ĝojas ke nia valora klasikaĵo ne iris trans la monton de "elĉerpitaj fantomoj".





## (librolegado libera)

## La Senfina Bedaŭro kaj la Bivistino

「長恨歌・琵琶行」

Estas libro maldika (80 paĝoj), malgranda kun plene da bildoj, tial ne malfacilas tralegi tiun ĉi libron. Sed pri kio temas? La libro entenas 2 famajn, longajn poemojn de ĉina literaturisto Bai Juyi [白居易 . vivinta de 772-a jaro ĝis la 846-a jaro], kaj elĉinigita de Hu Guozhu, fama ĉina esperantisto-tradukanto.


“La Senfina Bedaŭro” baziĝas de la historia fakto, ke la imperiestro Li Longji [隆基, 玄宗皇帝] de la Tang-dinastio – en la poemo “Monarko” –, dronis en amon al belulino Yang Yuhuan [楊貴妃], ignoris politikan vivon, kaj ribelantoj murdis Yang, kaj la Monarko retrovas ŝin en alimondo. La viglo kaj falo de la imperiestro ja aperis en lernolibro de historio kiel persono malsagiĝinta pro amo. Sed tiu ĉi poemo priskribas la amon de Monarko pura, kaj lian adoradon al Yang post ŝia morto kun simpatio. Al mi, iam sciinta la historion en lernejo, estis interese, kiel poeto amplene priskribas la aferon.

“la Bivistino” estas rakonto de virino, kiu

ludas kordinstrumenton bivo. Tiu virino estis iam fama en la ĉefurbo, sed nun loĝas en loko for de la ĉefurbo. La verkinto Bai Juyi mem estas ekzilito el la ĉefurbo, kaj tial ŝia sorto vekis lian intereson.

Estas interese, ke tiel mi ĝuas ĉinajn klasikaĵojn pere de Esperanto.

Lingva noto: la kordinstrumento estas ĉinlingve “pipa”, kaj la esperantigita formo “bivo” devenas de la japanlingva “biwa [琵琶]”, kiun la ĉina tradukinto alprenis kiel esperantigo de la muzikilo.



Noktservas ŝia bel' post vestad' en Ora Ĉambro, aŭ drinkon en printemp' ĉe banked' en Jada Turo. Ŝiaj fratinoj, fratoj ĉiuj ricevis rangojn. Al ŝia familio trafis honorsaturon.

## JOKOHAMO PLI NOVA (3) Stacio Jokohama renovigita

Kiel ĉefa enirpordo al Jokohamo funkcias fervoja Stacio Jokohama, uzata de pluraj fervojaj linioj. En “Gvidlibro pri Jokohamo kun Eseoj Hamalogiaj, 2017” estis skribite, ke “Stacidomo Jokohama estas rekonstruata ... renove malfermiĝos en 2020.” Vidu la foton pri



la renovigita sceno.

Precipe okulfrape alta estas 26-etaĝa “Jokohama Turo”. En ĝia 12a etaĝo estas subĉiela plafona ĝardeno, de kiu oni povas rigardi la urbon. Ĝis tiu etaĝo estas vendeja parto. Pli supra parto estas oficeja.

Sed por plimultaj, ĉiutagaj uzantoj de la Stacio, precipe ties okcidentflankaj uzantoj estas grava la sen-bezonigo de supren-malsupren-iraj ŝtuparoj. Uzantoj de la fervojoj, post elvagoniĝo, devis malsupreniri al subtera koridoro kaj supreniri por atingi la grundon. Cetere en la okcidento de la stacidomo estas granda subtera komerca distrikto. Ĝis antaŭe, la uzantoj de la fervojo devis malsupreniri, supreniri kaj denove malsupreniri por atingi la subteran komercan distrikton.

Sed laŭ la reformo, oni faris tunelon, do la stacidoma parto kaj la subtera komerca distrikto estas rekte alirebla, kvankam estas kelkaj ŝtupoj, ĉar la subtera nivelo iom diferencas. (SZ)